

ZAMENHOFA EKZEMPLARO

kompilita de Rihej Nomura, 2/2

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 1990-008-B-3, 1990.04.12.14.

Cl.- Parolas Claude GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La pasintan semajnon mi laŭdis la meritojn de la ĵus eldonita librego **ZAMENHOFA EKZEMPLARO** kompilita de la japano Rihej NOMURA. Mi raportis, ke tiu kvincentpaĝa verko entenas ĉiujn vortojn, kiujn Zamenhof uzis en frazoj, kaj ke ĉiuj cititaj ekzemploj indikas la trovlokon de la koncernaj frazoj. Ni diris la utilon de tia komplemento al Plena Vortaro de Esperanto por la lingvistoj, zamenhofologoj, leksikologoj, pedagogoj, esperanto-studentoj, verkistoj, redaktoroj kaj tradukistoj.

En la antaŭparolo al sia kompilaĵo Rihej NOMURA diras la bezonon de ekzemplaro por eksterokcidentanoj, kiuj lernas esperanton. Ni citu liajn dirojn:

"Ni devas lerni pri la uzado de la artikolo, la pluralo, la prepozicioj kaj aliaj gramatikaĵoj, komune akceptataj en la okcidentaj lingvoj, sed tute mankantaj en nia lingvo; ni devas lerni, kiuj adjektivoj kvalifikas iun substantivon, kaj kiuj adverboj iun adjektivon aŭ verbon, ĉar Esperanta vorto ofte ne estas identa kun japana vorto responda al ĝi. Ekzemple, en Esperanto oni diras "bela tago", "alta frunto", dum oni diras en japana lingvo "bona tago", "larĝa frunto" en la sama senco. Trovante en Esperanta libro la frazon "la suno jam subakviĝis", ni trankviliĝas, sciigantaj, ke tiu esprimo, ĉiutage uzata, sed tute kontraŭparolanta al la scienco, estas uzata ankaŭ internacie.

Rihej NOMURA poste klarigas, kial kaj kiel li komencis sian kompiladon de la vortuzoj zamenhofaj. Li diras:

"Kompreneble multaj esprimoj estas komune uzataj en multaj nacioj, sed mi konstatis, ke, se homoj uzos Esperanton ĉiu laŭ la dirmaniero de sia nacia lingvo, Esperanto iam disfalos je diversaj dialektoj, kaj ke tial ĝi devas baziĝi sur la Zamenhofa stilo. Kun tiu ĉi konstato mi komencis fari slipojn el ĉiuj Zamenhofaj verkoj, kiujn mi povis enmanigi al mi.

"Paralele kun la kolektado de slipoj mi ordigis ilin en la formon de ekzemplaro. En 1950 mi komencis maŝinskribi sur stenciloj kaj multoblige paĝon post paĝo. Tiel pasis super mi kelkaj jaroj, kaj nur en 1956 mi eldonis ĝin sub la titolo "Ekzemplaro Esperanta", 479 paĝoj kun japanlingva traduko por ĉiuj kapvortoj kaj ekzemploj, sed sen fontindikoj. La eldonkvanto estis nur 60, sed tio povus esti nomata ĝermo de tiu ĉi Ekzemplaro.

Temas pri la ĵus aperinta **Zamenhofa Ekzemplaro**, pri kiu ni raportas.

Rihej NOMURA loĝas en malgranda provinca urbeto kiel preskaŭ izolita esperantisto. En aŭtuno 1980 li ricevis neatenditan viziton de dek membroj de Nagoja Esperanto-Centro. Ni ree citu lin:

"La celo de ilia longa aŭtomobila veturado estis malkovri al mi sian planon publikigi mian tutan manuskripton en la formo de **Zamenhofa Ekzemplaro**. Sen hezito kaj pripensado, kaj eĉ kun plezuro mi akceptis ilian proponon de eldono, pri kies efektivigo mi ĝis tiam ne povis

havi esperon eĉ la plej malgrandan. Sed kiam mi tralegis mian manuskripton ankoraŭ unu fojon antaŭ ĝia transdono, mi pentis mian facilaniman konsenton, ĉar mi trovis, kiel ĝi estas plena de multaj malbonaĵoj kaj korektindaĵoj, kaj kiel senorde kaj sen la principo ĝi estas aranĝita. Mi komencis novan laboron super mia tuta manuskripto ŝanĝante kaj aldonante ekzemplojn. Dum tiu ĉi laboro mi ofte meditis pri tio, kiel aranĝi la tutan enhavon. La ĉefa celo en la komenco estis montri la uzadon de verboj kaj prepozicioj, sed baldaŭ al mi ŝajnis, ke diversaj esprimoj rilataj ai iu vorto estas tiel same gravaj kiel la gramatikaj scioj. Mi enmetis ekzemplojn kun diversaj esprimoj, kaj samtempe aldonis kiel kapvortojn ankaŭ multajn substantivojn, kiuj prezentas per si mem nenian malfacilecon en la uzado. Ekzemple sub la kapvorto "ond-o" mi kolektis kiel eble plej multajn esprimojn rilatajn al ĝi, tiel ke tie oni sciu, ke ondoj povas bati, ludi, ŝaŭmi, muĝi, plaŭdi, ruliĝi, flustri, k.t.p.

Rihez NOMURA laboris en malfacilaj cirkontancoj. Ni aŭdu lin pri tio:

"Parto de mia manuskripto estas pretigita sub tre premaj kondiĉoj en la tempo dum kaj tuj post la Dua Mondmilito. Al mi estis neeble aĉeti, ne parolante jam pri skribmaŝina rubando, eĉ paperon por manuskripto. Mi maŝinskribadis per eluzita rubando sur la dorsoflankon de malbonkvalitaj presaĵoj. Pasis de tiam multaj jaroj, flaviĝis tiuj paperoj kaj la vidado de miaj okuloj estas jam tro malforta por distingi la neklarajn literojn.

Profesoro Akira MORITA, la prezidanto de Nagoja Esperanto-Centro, alportis sian helpon al Rihez NOMURA. Li opiniis fontindikojn gravaj kaj karakterizaj por la Ekzemplaro, kaj faris la korektadon de tiuj indikoj kun granda efikeco. Tiel oni povas preskaŭ diri, ke li kunaŭtoras la verkon **Zamenhofa Ekzemplaro**.

Incendio okazigis gravajn perturbojn dum la redaktado de la manuskripto. Ni citu Rihez NOMURA:

"La legantoj iafoje trovos, ke gravaj ekzemploj, cititaj kiel Zamenhofaj en Plena Ilustrita Vortaro aŭ aliaj vortaroj, mankas en tiu ĉi **Ekzemplaro**. Ĉi tie mi devas konfesi, ke en la jaro 1949 tuj apud mia loĝejo okazis brulego. Feliĉe mia loĝejo apenaŭ brulis, sed kiam oni forportis ĉion eksteren el mia ĉambro, parto de la slipoj, kies kolektado komenciĝis dek sep jarojn antaŭe, kaj kiuj estis en kartonaj skatoletoj, aŭ perdiĝis el rompita skatoletoj, aŭ ĉifoniĝis pro la estinga akvo ĝis nelegebleco. Tio ŝokis min tiel forte, ke mi tute perdis la kuraĝon kaj preskaŭ volis ĉesigi la laboron. Mi tamen decidis daŭrigi la laboron per la restintaj slipoj, pensante, ke "io estas pli bona ol nenio", ĉar tiu ĉi mia laboro en tiu tempo estis farita nur por mia propra uzo, kaj mi ne havis eĉ la plej malgrandan supozon, ke oni iam intencos publikigi miajn kalendarojn en la formo de libro. Tamen el la libro "Marta", la verko, kiu liveras plej abundajn esprimojn, precipe koncerne la ĉiutagan vivon, mi refoje faris slipojn. Se mankas gravaj Zamenhofaj ekzemploj en tiu ĉi **Ekzemplaro**, tio kaŭziĝas parte de la malmulteco de Zamenhofaj verkoj, kiujn mi posedas, kaj de mia preteratento, sed, mi kredas, plejparte de tiu ĉi malfeliĉa akcidento.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude GACOND diras al vi: Ĝis reaŭdo!